# LA INFORMILO

INFORMBULTENO PRI ESPERANTO
Bulletin d'information sur l'Esperanto

Eldonisto ) FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO
Editeur ((ESPERANTO-FEDERACIO de ORIENTA FRANCIO)
Maison des Jeunes et de la Culture - 27, rue de la République -F 54000 NANCY

Trimestriel - Nouvelle série n° 1 - 1er trimestre 1973
Abonnement 1 an : 5 fr. - Le numéro :1,25

Le bulletin Concorde ne pouvant plus insérer nos informations, ce nouveau bulletin est destiné à le remplacer. Nous pensons que la vie de l'Esperanto en général, en même temps que celle de notre Fédération régionale, ont besoin du soutien actif de tous les espérantistes de notre région et de tous les élèves de nos cours.

Nous vous invitons à régler votre abonnement à La Informilo (5 f), si possible en choisissant une cotisation comprenant cet abonnement (n° CCP et tableau page 4).

Vous assurerez ainsi le maintien d'un lien entre nous.

Faites que l'Esperanto vive !

Car la bulteno "Concorde" ne plu povis enpresi niajn informojn, ni rekreis nian "Informilon" por anstataŭi ĝin.

Ni pensas ke la vivo de Esperanto ĝenerale, kaj samtempe la vivo de nia regiona Federacio, nepre bezonas la subtenon de ĉiuj esperantistoj en nia regiono kaj de ĉiuj lernantoj de niaj kursoj

Ni petegas vin aboni nun La Informilon (5 F, aŭ 6 internaciaj respondkuponoj) aŭ por francaj esperantistoj, elekti kotizon kun tiu abono (tabelo, 4an paĝon).

Tiel vi certigos la ekziston de ligilo inter ni. Organizo sen ligilo inter siaj membroj estus senviva.

Faru ke Esperanto vivu !

La Prezidanto :J.P. COLNOT.

NIA PLANO :
=========

Eldoni ĉiutrimestre bultenon 4-paĝan - 2 paĝoj entenos informojn en Esperanto 2 paĝoj informojn franclingvajn pri Esperanto en Francio kaj en la Mondo.

<u>Aktivuloj</u> bonvolu sendi resumitajn franclingvajn tradukojn de interesaj, kuraĝigaj informoj aperintaj en la Esperanto-Gazetaro. Tiel la bulteno utilos ankaŭ por informado al neesperantistoj. Tekstojn por la Informilo n° 2 vi bonvolu sendi <u>antaŭ la 15a de marto</u> al : Sro André GROSSMANN - Bât. D 2- rue de la Doller - F 68110 ILLZACH.

---

## Invito al la 32-a Orient-franca kongreso de Esperanto
## kaj al la Internacia renkontiĝo
## Sabaton la 5-an kaj dimanĉon la 6-an de majo 1973

Nia kutima regiona kongreso okazos en 1973 en la sidejo de la Federacio : Maison des Jeunes et de la Culture (Junuldomo), 27, rue de la République (aŭ 6,rue Frédéric Chopin) en NANCY.

Ekde la sabato okazos internacia renkontiĝo. En ĉi-tiu numero de La Informilo, ni povas doni al vi nur provizoran programon, sed ni zorgos plibonigi kaj kompletigi ĝin, por ke tiu du-taga aranĝo allogu plej eble multe da samideanoj. Verŝajne en Aprilo, se eblas kaj necesas, ni sendos pli kompletajn informojn al la aliĝintoj aŭ interesiĝantoj.

Ni jam ricevis diversajn sugestojn, kaj sin-anoncis dudeko da personoj, por la du-taga aranĝo. Verŝajne tiu nombro duobliĝos ĝis majo. Laŭ la alvenhoroj de la partoprenontoj ni starigos la sabatan programon. Vi povas alveni jam vendrede aŭ pli frue, kaj forveturi nur en la semajno post la kongreso ; sed bonvolu antaŭ-rezervi la necesajn litojn.

...

Ĉiuj tranoktadoj kaj manĝoj okazos en la Centra Junuldomo kaj en ĝia Hejmo por junaj laboristoj. Ĉambroj treege komfortaj. Entute 172 litoj, 7 etaĝoj, 2 liftoj.(Vidu anoncon en la Jarlibro de UEA 1972-73). La ĉefa enirejo (norda) troviĝas : 27, rue de la République, sed ĝi estas fermita nokte kaj dimanĉe. Memoru, ke la suda enirejo -(6, rue Frédéric Chopin) estas ĉiam malfermita (eĉ nokte). La pli vasta parkejo troviĝas ankaŭ ĉe Chopin-strato).

Bonvolu anonci vin kiel eble plej baldaŭ, ĉefe se vi deziras tranokti, ĉar la Hejmo estas ofte okupata de diversaj asocioj, kiuj organizas en ĝi kongresojn kaj seminariojn. Ni provizore rezervis 50 litojn.

Se vi aliĝos tro malfrue, ni devus direkti vin al hoteloj, pli multekostaj, kaj eble malpli komfortaj.

La okazoj renkonti nin en Esperantujo estas ĝenerale malmultaj. Tamen en la nuna jaro okazos proksime de ni la SAT-Amikara Kongreso en Lausanne (je Pasko), nia Federacia kongreso kaj internacia renkontiĝo en Nancy la 5-an kaj 6-an de majo, la familia renkontiĝo en la Hingrie la 26-an kaj 27-an de majo, kaj la Eŭropa kongreso en Luksemburgo je Pentekosto. Ni esperas ke vi multnombre, entuziasme, interese, ĉeestos tiujn diversajn aranĝojn.

Al vi ĉiuj ni diras : ĝis baldaŭ en Nancy !

oooooooooooooooooooooooo

## PROGRAMO

Tagordo de la laborkunveno (federacia kongreso) : dimanĉe je la 9-a horo :

- Raporto de la Sekretario kaj de la Kasisto, pri la funkciado de la Federacio
- Nia bulteno
- Raportoj de la respondeculoj el la diversaj urboj.
- Debato pri tiuj diversaj raportoj.
- Studo de la Jar-raporto kaj aliaj tekstoj el UFE.
- Elekto de nia delegito al la Nacia Kongreso.
- Proponoj, rezolucioj, voĉdonoj por la Nacia Kongreso.
- Renovigo de trionoe la Federacia Komitato : la mandatoj de la 4 jenaj komitatanoj nun finiĝis : S-roj Colnot, Durand, Richerateaux, Wermelinger. Ili bonvolu anonci sian rekandidatiĝon, novaj kandidatoj bonvolu anonci sin al la Prezidanto, se eble antaŭ la kongres-tago.
- Diversaĵoj.
- Je la 12-a 30 precize ; komuna tagmanĝo.

### Provizora distra kaj kultura programo

- Por la sabato, ekzistas diversaj eblecoj :gvidata vizito al la malnova urbo, vizito al regioneca muzeo (Posttagmeze), vizito al la lumigita urbodomo (vespere). Krome lum-bild-parolado de S-ino Oehri :"Djerba, oazo en la maro" kaj diversaj prelegoj, skeĉoj, rakontoj, eĉ aliaj diapo-prezentadoj (ne forgesu anonci vian kontribuon plenigante la aliĝilon).

- Dimanĉe post-tagmeze :

- de la 14-a ĝis la 15-a horo ; Komitata kunveno.
- samtempe : ekzamenoj, 1-a grada, 2-a grada. (Kandidatoj bonvolu anonci sin).
- por personoj dezirantaj promeni :vizito al proksima parko "Sankta Maria".
- je la 15-a horo : lumbil-parolado de S-ino Oehri : "Orientaj limoj de Saharo".

Kiel sabate, ni zorgos kompletigi tiun programon per skeĉoj, rakontoj, prelegoj. Ni disponas krome pri diversaj temoj de diapozitivoj (i.a. Primoŝteno) kaj kompreneble pri bonega projekciilo.

...

# COTISATIONS 1973

Le Trésorier de la Fédération de l'Est pour l'Esperanto vous indique ci-dessous le taux des cotisations pour l'année 1973 à verser à :
CHAPELLIER Jean - 109, Avenue de la Malgrange - 54140 JARVILLE au CCP 399-75 NANCY

| | Membres âgés de : moins de 22 ans | Membres âgés de : plus de 22 ans | Vous recevrez : |
|---|---|---|---|
| 1/- Membre adhérent (UFE & UEA)........... | 13,00 F | 13,00 F | 1 & 2 |
| 2/- Membre titulaire "Junior" ........... | 28,00 F | - | 1 - 2 & 3 |
| 3/- Membre titulaire ................... | - | 43,00 F | 1 - 2 & 3 |
| 4/- Membre Individuel (M.J.)............ | 40,50 F | 68,00 F | 1 - 2 - 3 -4- |
| 5/- Membre Individuel (M.A.)............ | 65,50 F | 93,00 F | 1-2-3-4 & 5 - + 6(jusqu'à 25 ans). |

Selon la cotisation choisie, vous recevrez :

1.- Carte de membre de UEA.(pour les nouveaux adhérents) et feuillet 1973 de coupons donnant droit aux services des 3500 délégués mondiaux.

2.- Bulletin trimestriel "La Informilo".

3.- Revue Française d'Espéranto (bimestrielle)

4.- Annuaire international (adresses des 3500 délégués mondiaux)

5.- Revue mensuelle de U.E.A. "ESPERANTO"

6.- Revue pour Jeunes "KONTAKTO" envoyée gratuitement aux membres JMA jusqu'à 25 ans

NOTA - Exceptionnellement, les membres du groupe de Strasbourg, dont la trésorière est F-ino FIX Violette -13, rue Louis Apffel -67-STRASBOURG, sont priés de verser leur cotisation au "Centre Culturel ESPERANTO" CCP 499-17 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au groupe, qui s'élève à 5 F.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

- Mi alvenos la : je la Horo

- Mi foriros la : je la Horo

- Mi rezervas ....... lito(j)n en 1-lita ĉambro, po 12 F.
  ....... lito(j)n en 2-lita ĉambro, po 11 F.
  ....... lito(j)n en 3 aŭ 4-lita ĉambro, po 10 F.

- Mi rezervas manĝojn por (indiku kiom da personoj) (trinkaĵoj krome pageblaj).

  - sabate tagmeze (7 F) : vespere (7 F.) :
  - dimanĉe Matene (1,50 F.) : tagmeze (7 F.) : vespere :en alia restoracio (iom pli koste)

- Mi interesiĝas sabate pri :
  - vizito al la malnova urbo (principe matene)
  - vizito al la regioneca muzeo (principe post-tagmeze)
  - vizito al la lumigita urbo-domo (vespere)
  Prezo de ĉiu vizito :2 aŭ 3 F. por 1 persono, laŭ la nombro da partoprenantoj.

- Neniu antaŭ-pago aŭ kotizo estas petata.

Subskribo :

Aktiveca raporto por la jaro 1971-72

Nia kongreso okazis en Strasbourg la 26-an de marto 1972, kun 60 partoprenantoj. Estis elektita nova estraro.

Kvankam la plej multo de niaj membroj frue aliĝis kompare kun antaŭaj jaroj, tamen ni finfine havis nur 108 membrojn anstataŭ 109 pasint-jare. (gajno de 21 novaj kaj perdo 22).

Ekzistas 2 grupoj : En Strasbourg kun 39 membroj kaj en Nancy kun 12 membroj. Sed krome okazas kunvenoj en Mulhouse (8 anoj), Colmar (6), Bar-le-Duc (5), Epinal (4).

Publikaj kursoj okazis jene : 2 en Nancy, 2 en Strasburg kaj 1 en Mulhouse (en la kadro de Université Populaire) kun inter 2 kaj 10 gelernantoj. Krome en Vittel, S-ro Collin komencis kurson en lernejo, kun 25 lernantoj, post Pasko 1972 ; ĝi daŭrigas post oktobro 1972. El Nancy, 44 artikoloj estis dissenditaj al la gazetaro, por la koresponda kurso ; respondis 127 informpetoj, enskribiĝis 42 gelernantoj por la 1-a grada kurso, kaj 7 por la 2-a grada.

Ekspozicio "La Libro Esperanto" okazis dum oktobro en Bar-le-Duc, Nancy kaj Epinal; ĝi daŭris dum 1 ĝis 5 tagoj.

Okazis renkontiĝoj en la Hingrie kaj en Nancy kun dudeko da partoprenantoj. Federacianoj partoprenis feriojn en Primoŝteno, la Nacian Kongreson, la U.K. en Portland, diversajn aranĝojn en Grésillon, en Svisujo kaj aliloke.

A. GROSSMANN.

Funebra avizo. En novembro forpasis nia estimata membrino F-ino Alice RIHN, 72-jara, emerita lernejestrino en Mulhouse.

Pro ŝia afableco kaj aktiveco, ŝi gajnis multajn simpatiojn. Al ŝiaj familianoj ni prezentas niajn sincerajn kondolencojn.

A. L.

---

Aliĝilo al la 32-a Kongreso de Orient-franca Federacio
kaj internacia renkontiĝo en Nancy la 5/6-ajn de majo 1973

(Bonvolu resendi plej eble baldaŭ al S-ro J.P. Colnot, 15, rue de Lavaux - F 54520 LAXOU)

Nomo : Antaŭnomo :
Adreso :

- Mi partoprenos la 32-an kongreson en Nancy dimanĉe, Jès Ne
- Mi partoprenos la internacian renkongiĝon sabate Jes Ne

Mi estos akompanata de : la edzino, kaj . . . . infanoj ; . . . . . aliaj personoj.

- Mi dezirus trapasi la ekzamenon : 1-a grado - 2-a grado.
- Mi estas kandidato por la nova komitato
- Mi sugestas por la programo :
- Mi-mem prezentos : diapozitivojn, rakonto(j)n, skeĉo(j)n, prelego(j)n, aliajn :
- Mi proponas ke la 33-a kongreso okazu en ........
- Mi ne povas ĉeesti, mi transdonas mian voĉon al ...............) por membroj.
- aŭ mi transdonas mian voĉon al la asembleo.....(

Subskribo :

ENQUETE SUR L'ESPERANTO

Le vice-président de l'U.F.E., M. SAUDIAN-ROUSSEAU, vient d'envoyer à tous les groupes de France, une circulaire et un modèle de questionnaire pour un sondage auprès du public.

Nous nous efforçons d'éditer 500 questionnaires, dont 1 exemplaire est joint à ce bulletin. Veuillez commencer à enquêter en recopiant au besoin un certain nombre de questionnaires (vous pourrez obtenir des questionnaires supplémentaires en les demandant à M. CHAPELLIER). Ou aussi utiliser de simples feuilles blanches et n° des questions.

Profitez de cette enquête pour informer vos interlocuteurs sur l'Esperanto. L'enquête se terminera le 31 mai. A cette date, veuillez informer des résultats M. André GROSSMANN - Bât. D2, rue de la Doller - 68110 ILLZACH.

Indiquez le nombre de personnes interrogées, le nombre de oui et de non à chaque question, etc... Merci d'avance.

- - - - - - - - - - - - - - - -

Aux nouveaux élèves de nos cours

Notre congrès régional, avec rencontre internationale aura donc lieu à NANCY, MJC, 27, rue de la République, les 5 et 6 mai. Conditions particulièrement avantageuses : repas à 7 F, petit déjeûner 1,50 F, nuit de 10 à 12 F (chambres à 4-3-2 et 1 lit). Nous vous invitons à participer nombreux à ce congrès. Renvoyez dès que possible le bulletin d'adhésion (Aliĝilo). Si vous ne comprenez pas encore tout le texte, efforcez vous d'indiquer clairemant le nombre de lits retenus, pour quelle(s) nuit(s) et quelle catégorie de chambre, le nombre de repas, vos dates et heures d'arrivée et de départ.

Nous avons retenu 50 lits et ne pourrons donc garantir l'hébergement qu'aux 50 premiers inscrits.

Nous nous efforcerons de mettre au point un programme spécialement conçu pour vous, suivant le nombre de débutants (Mentionnez sur votre adhésion "débutant").

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

JUNULARA INFORMO

JEFO invitas vin por la Paska kultura Semajno 1973, kiu okazos en la Kastelo de Grésillon, de la 11-a ĝis la 17-a de aprilo 1973.

La temo de la Semajno estas "Kunvido" inter homoj, inter socio, inter malsamaj politiksistemoj, inter generacioj.

La programo ankaŭ enhavas distrajn partojn, apud-fajra vespero, balo, ekskurso, ktp...; ĉio en tre juna, amika kaj ĉefe internacia etoso.

La aliĝ-kotizo estas por eksterlandanoj kaj JEFO-membroj ricevantaj "Koncize" 160 F.F. Por ali-uloj 170 FF. Ĝi entenas ĉion (manĝado, loĝado en komuna ĉambro, ekskurso ktp...)

Por familia ĉambro oni pagas + 24 FF kaj por aparta ĉambro + 48 FF.

Vi povas peti la aliĝilon al nia Kasisto : André GROSSMANN - Bât. D2, rue de la Doller - 68110 ILLZACH.

oooooooooooooooooooooooooooo

SAINT-LOUIS (68) - En la Junuldomo de St-Louis, apud Bazelo, okazos dum Majo semajno pri la Homaj Rajtoj kun konferencoj kaj kunvenoj. Ekspozicio estas aranĝata pri tiu temo, kaj se eblos, projekcio de filmoj. La datoj ne estas ankoraŭ fiksitaj.

La 25/26-ajn de majo 1973, la Monda Konsilio & la Internacio de Militrezistantoj organisos internacian renkontiĝon de junuloj kaj de Milit-rezistantoj.

Interesiĝantoj sin anoncu al S-ro Jean-Paul MARMIN, 62, rue de Mulhouse - 68300 ST LOUIS.

- - - - - - - - - - - - - -

NB.- Plurajn informojn pri Strasbourg, Nancy, Epinal, Bar-le-Duc, ktp, ni ne povas enpresi Ili aperos en nia aprila bulteno.

---

Le Gérant : J.P. COLNOT - Imprimé par l'Office Municipal de la Jeunesse
20, quai Claude Le Lorrain -54000 NANCY.